

Pola Esperantisto

XXXI
JARO

APRILO
1937

Esperantysta
Polski

ELDONANTO WYDAWCA POLLANDA ESPERANTO-DELEGITARO
REDAKTANTOJ PROF. DR ODO BUJWID — MGR TAD. HODAKOWSKI
REDAKTORZY

APERAS LA 1-an DE CIU MONATO. REDAKCIAN MATERIALON ONI PETAS SENDI ĜIS LA 20-a DE
CIU MONATO. LA REDAKCIO ESTAS RAJTIGITA LA Ĉ BEZONO SANGI LA TEKSTON DE MANUSKRIPTOJ.



Dro Jan Mędrkiewicz

La 9. de aprilo k. j. mortis en Lublin Dro Jan Mędrkiewicz, unu el la veteranoj de esp. movado en Polujo. Jam kiel 17-jara gimnaziano li fariĝis fervora adepto de Esperanto, kaj en la jaro 1907 organizis en la gimnazio de Chrzanowski en Varsovio kurson por 40 lernantoj. Ĉi tiun kurson gvidis la granda majstro de esp. poezio Antoni Grabowski. La karmemora Dro Mędrkiewicz aranĝis en la sama jaro somere la unuan kongreson de polaj esperantistoj en Kazimierz. En la jaro 1929 Li transloĝiĝis el sia naskurbo Lublin al Łódź, kie Li en la jaro 1929 prezidis la tian Esp. Societon. En la jaro 1930 Li organizis en Łódź Esp. Sciencpolitikan Sekcion, kiu kun modela vigleco laboris por favorigi la registarajn kaj diplomatajn sferojn al nia movado kaj prepari enkondukon de

deviga instruado de Esperanto en la lernejoj.

La esp. gazetaro perdis en la Mortinto unu el la plej eminentaj publicistoj, kiu havis originalajn ideojn pri organizaj demandoj koncernantaj nian movadon, kaj scipovis kuraĝe ilin defendi. Li ne konis kompromisojn. Konvinkita pri praveco de siaj opinioj rilate la centran organizon de nia movado Li kun juneca ardo kaj elokventeco pledis por ili dum la universalaj kongresoj kaj en la gazetoj.

En nia gazeto ofte aperadis atentindaj artikoloj el Lia plumo, kiuj elvokadis iafoje pasiajn kontraŭdirojn flanke de niaj gvidantaj faktoroj.

Al Lia familio ni esprimas nian profundsentan kondolencon.

La Redakelo.

PRI LINGVOJ INTERNACIAJ KAJ ILIAJ PORTANTOJ.

Plej ofte oni komencas historion de lingvo internacia, citante unuajn primitivajn individuajn provojn de kreado de artefarita lingvo aŭ de aliaj iloj por pli larĝa interkompreno de homoj. Poste oni mencias tre mallonge latinan lingvon kaj volapükon kaj poste transiras al Esperanto. Tiamaniere oni ne tuŝas la plej gravan aferon en tiaj historiaj rilatoj, nome kondiĉojn, kiuj kaŭzas ekaperon kaj helpas al la uzado de lingvoj internaciaj. Tiaj lingvoj ne estas nur latina; ŝi estas tre multnombraj — ĉiu en sia tempo kaj en sia rondo de nacioj kaj naciotoj, devigataj de unu aŭ kelkaj kaŭzoj uzi komunan interkomprenilon. Mi mem aŭdis kaj parte uzis, estante en Kaŭkazo, tataran lingvon, tre facilan kaj taŭgan por la interkompreno de tiel multaj malgrandetaj naciotoj en tiu etnografia muzeo, kie ofte sekvantaj unu post alia apartaj montaraj valoj enhavas apartajn kaj tute diferencajn de najbaroj popolojn. Plie en centra Azio simila rolon ludas mongola lingvo, kiu ŝajnas al mi esti parenca al la tataro. Mi opinias, ke ekzistas sama afero en multaj aliaj lokoj (ekz. en Hindujo). Kial tiuj, sed ne aliaj lingvoj fariĝis tie internaciaj? Kiaj kaŭzoj difinis limojn de ilia disvastiĝo? Ĉiuj ĉi kaj multaj similtaj demandoj havas grandan signifon ne nur kiel historio, sed ankaŭ por praktikaj celoj — por la esploro de plej bonaj propagandrimedoj por komuna interkomprenilo kaj — mi opinias — ke pli aŭ malpli frue esperantistoj de diversaj lokoj de terglobo ilin ekscentos kaj ĝuste respondos por la bono de nia Esperanto kaj homaro.

Mi volas tie ĉi diri kelkajn vortojn pri la ĝeneralaj kondiĉoj de la aperado de specialaj komunaj interkompreniloj kaj lingvoj, kiam ili estas kunligitaj kun iaj laŭsence eksternaciaj historiaj kaj sociaj aferoj, samtempe montrante mallonge, kiel mi povas en malgranda arlikoleto, plej favorajn kondiĉojn por la disvastiĝo de Esperanto.

Kiuj do estas eksternaciaj, t. e. koncernantaj du aŭ kelkajn naciojn, aferoj? Ni citu la plej gravajn el ili, montrante samtempe verŝajnan rilaton al la ebleco de la komuna lingvo.

Ofte en historio de popoloj mi renkontas subigon de unu popolo al la alia. Kompreneble, ke en tiaj kondiĉoj estas necesa komuna interkomprenilo, sed ĝi estas deviga kaj dank'al tio ne daŭra kaj ne ĝenerale uzata. Ofte devigeco iras ĝis tia grado, ke unu el du lingvoj estas malpermesita por uzado en lernejoj kaj la alia estas deviga. Sed tio ĝin ne faras ĝenerala interkomprenilo — tute kontraŭe. En mia supre citita ekzemplo el Kaŭkazo tiaj malgrandaj popoloj havis lernejojn kun deviga rusa lingvo, sed unuj el ili ne vizitadis lernejojn, aliaj forgesis rusan lingvon, triaj tute ne volis ĝin paroli, kaj mi en miaj rilatoj kun ili tre ofte estis devigata uzi vortojn de tataro lingvo. Same estis en Polujo rilate la rusoj kaj preskaŭ same ritate al germanoj. Post ilia foriro ĉiuj baldaŭ forgesis tiujn devigajn lingvojn. Mi devas diri, ke mi ĝenerale ne tre ŝatas devigecon, ĉar mi scias, ke en niaj lernejoj ni lernis devige latinan, grekan, francan, germanan lingvojn, sed ne eĉ unu ellernis perfekte. Do kun malkvieto mi pensas pri dezirata ĝenerale en niaj rondoj enkonduko de deviga instruado de Esperanto en lernejojn. Ĉu tio helpus al nia afero? Al mi ŝajnas, ke nur tiam, kiam postuloj de vivo mem tiun helpadon subtenus. Kaj tio estas ĉefa afero.

Por la politikaj interrilatoj, de du aŭ pli da popoloj kompreneble komuna interkomprenilo, lingvo internacia, estus utila. Sed ĉar tiuj interrilatoj estas tre maloftaj, en pasintaj tempoj tute sufiĉis tradukistoj. Kaj nun partoprenas tiajn rilatojn tre malmultaj personoj, eminentuloj tiuj bone scias multajn lingvojn. Ligo de nacioj en Ĝenevo ĉiam konsistas el poliglotoj, fieraj de tiu poligloteco. Bedaŭrinde ni, esperantistoj, ne trovis ĝis nun inter ili eĉ unu personon, kiu estus ankoraŭ pli fiera, sciante ankaŭ esperanton. Tiam ankaŭ aliaj personoj kaŭze de poligloteemo verŝajne imitus lin.

En komercaj interrilatoj ia interkomprenilo estas utila, sed tio ne nepre devas esti perfekta internacia lingvo. Ĉar komplete kompreno inter ambaŭ flankoj ne estas necesa kaj eĉ malutila al la pli forta flanko, kiu ĝenerale komercadon regas. Tiakaŭze ĝis nun en ko-

merco Esperanto ludas preskaŭ nentan rolon kaj same estos en estonteco. Same estis en pasintaj periodoj. Lingvoj nek fenika, nek armena, nek hebrea fariĝis ĉe parte internaciaj, kvankam ili estis kaj parte nun estas tre komercemaj popoloj. Komprenoble en kooperado, kiu estas nobligita komerco, internacia lingvo povas havi pli granda influon kaj aplikadon.

Oni povas opinii ke sporto — nova regiono de la internacia lingvo — nepre devas esti loko de bona disvastiĝo de komuna interkomunikilo. Sed fakte oni tion ne vidas. Grandaj internaciaj olimpiadoj okazadis tute sen Esperanto aŭ kun tre negrava ĝia partopreno. Laŭ mia opinio tio dependas de karaktero de ĉiu ĉi socia fenomeno. Ĝi ne estas apero de plej alta intelekta disvolviĝo de homaro, kiel lingvo internacia. Pli ĝuste ĝi estas reakcio kontraŭ ĉiuj certa troeco de kulturo, do ankaŭ tagrade reakcio kontraŭ ĉiu lingvo. En siaj tre simpligitaj taskoj kaj faroj, sportistoj reciproke sin komprenas sen superfluaĵ vortoj, uzante nur primitivajn kriojn, kaj fajfadojn, signalojn de movoj kaj de ludo de muskoloj. Sporta kampo por Esperanto estas nek grava nek fruktodona.

Sfero de religiaj ideoj ankaŭ ne estas kampo por internacia interkomunikilo. Kvankam multaj religioj havas ĉiuj sian lingvon por la liturgio kaj komunikoj de pastroj, kiel en katolika religio — latina lingvo aŭ nur por liturgio, kiel en ortodoksa speciala preĝ-rusa lingvo, sed neniam kaj neniel religio tian lingvon faris lingvo de ĝenerala uzado inter adeptoj. Kristanaj religioj, ekzemple diras: „estas por ni nek greko nek hebrea“, montrante tiel, ke por ili estas tute indiferenta nacieco kaj lingvaneco de adeptoj. Disvastiĝo de latina aŭ araba lingvoj kune kun disvastiĝo de religioj povas kaŭzi miskomprenon. Sed nepre tia disvastiĝo dependis ne de religia, sed de kultura kapableco de tiuj

lingvoj. Kiam portisto de lingvo estas nur religio, ĝi ne disvastiĝas, sed ĉe falas, kiel ni tre bone vidas en prahebra lingvo, havanta eĉ gravajn praliteraturarojn, kiu estas ĝis nun uzata en religio hebrea. Samtempe adeptoj en vivo uzas diversajn lingvojn: spaniŝ, jidiŝ kaj pli kulturaj simple: francan, germanan, polan.

Sfero de arto plastika kaj arto literatura ludas nentan rolon en internacia interkomprenilo, ĉar unua estas rilate al lingvo tute neŭtrala, la alia disvolviĝas samtempe kun lingvo kaj ĝin influas ĉiuj faktoroj kaj sammaniere, kiuj influas lingvon. Ĉar literaturo estas kvazaŭ animo de lingvo, malproksima al la praktikeco, posedanta valoron en si mem.

Fine ni alvenas al la plej grava parto al la sfero de sciencoj, kie ni povas enkalkuli sciencan puran kaj aplikitan: nome teknikon kaj medikan arton. Tiu sfero de intelekta kulturo esence estas parenca al la ideo de lingvo internacia kaj apartenas al la plej alta grado de homaj kapablecoj kaj taskoj, kiuj plenumplekse povos efektiviĝi sole per kooperado de multaj nacioj. Tia kultura disvolviĝo ĉiam portas ian lingvon, kiu samtempe havas inklinon fariĝi aŭ vere fariĝas internacia. Ni povas citi: grekan, latinan, araban, ĥinan kaj aliajn lingvojn, kiujn portadis apartenanta kulturo. Monstrinda estas rolo de medicino eŭropa en internacia disvastiĝo de latina lingvo aŭ de medicino tibeta en meza Azio, kiu disvastiĝas tibetan kaj mongolan lingvojn. Lastatempe ni vidas, ke ankaŭ Esperanton forte subtenas kuracistoj kaj medicinaj journaloj. Kaj tio estas tute komprenbla, same ankaŭ fakto, ke elpensinto de Esperanto estis kuracisto.

Do en tiu kaj helpe de tiu alta kultura sfero de homara disvolviĝo ni povas plej certe atendi triumfon de nia lingvo. Kiamaniere ĝin plirapidigi en tiu sfero, mi diros en sekvonta artikolo.

IPE.

**AMIKO, KARA SAMIDEANO,
ESTU NIA KONGRESANO!**

**ESPERANTAN TEATRON GUOS VI
DUM LA KONGRESO EN VARSOVO!**

UWAGA!

Wszelkie wpłaty abonamentu miesięcznika „Pola Esperantisto” uskuteczniać można na konto PKO Nr. 406.660 lub przekazem rozrachunkowym, kartoteka Nr. 29, co zaoszczędzi wpłacającym koszty przesyłki.

DRO LEOPOLD DREHER.

LERNU DE ALIAJ!

Ne nur la lingvon, kiu en „Laborista Esperantisto” estas bona, neriproĉebla, sed ĉion alian ni devas lerni de ĝi kaj de la nederlanda „Federatie van Arbeider's Esperantisten”, kiu eldonas ĝin en la eldonnombro de 7600 ekzempleroj. I-magu: sep mil sescent ekzempleroj! Nia „Pola Esperantisto” ja ne atingas eĉ la eldonnombron dekonan!

Bona, kreteca papero, granda formato, duobla kompare kun tiu de P. E., grandaj kaj malgrandaj, sed tre bone legeblaj literoj — jen la aspekto de la organo de niaj nederlandaj laboristaj samideanoj. La gazeto estas senpage sendata al la membroj de la „Federatie”, sekve la mebraro nombras minimume 6000.

Ĉu rezulto de bona labortaktiko, certe pli bona ol ĉe ni, aŭ simptomo, ke Esperanto entute pli bone taŭgas por maldekstruloj ol por ni, t. n. „neŭtraluloj”?

Certe a m b a ŭ faktoroj kunagas. Ĉar se ni scius labori laŭ sistemo pli celkonforma, ni povus almenaŭ iom proksimigi al rezultoj tiaj, kiajn elmontras aliaj neŭtralaj esp. organizaĵoj, ekz. al tiuj de BEA (British Esperanto Association), kvankam ni uspozas, ke eĉ BEA ne povas kompari sin laŭ nombro de anoj al la laborista esp. organizaĵo de Nederlando.

Sekve, mi pli emas kredi, ke la kaŭzo de la malalta stato de nia landa movado konsistas prefere en la alia faktoro, nome en tio, ke niaj lingvo kaj ideo respondas multe pli intime al la spirito de la laboristoj kaj de aliaj „maldekstruloj”, ol al nia propra, la „etburĝa”.

Kio instigas nin, neŭtralulojn, al propagandado de Esperanto kaj ties disvastigado?

Ĉu la lingvo mem kaj ĝia belsoneco kaj logikeco? Tre certe ne, ĉar nur kelkaj el ni estas tiom lingvamaĵe ĝenerale, ke la strukturo mem de la lingvo Esperanto, lingvo belforma kaj agrabla, sufiĉas por reteni nin porĉiam eĉ la ideo de nia Majstro.

Ĉu kaŭzis tion simpla scivolemo pri lingvo artefarita, kiam la homo neniam

vidis tiel vaste uzata kaj uzebla? Versajne ne, ĉar tio ne sufiĉas por interesi pli ol kelkan tempon, dum tiom da aliaj interesaj aĵoj ekzistas en la mondoj scienca kaj artaja.

Kaj eble kaŭzis tion, la fakto, ke inter esperantistoj, homoj larganimaj, troviĝas multaj eminentuloj, kiujn ni deziras imiti kaj kies apogon ni ŝatus elprofiti? Versajne ne, ĉar pli aŭ malplifruce ni konvinkigus, ke tro malmultaj estas inter la esperantistoj tiaj homoj, influhavaj kaj multe pli profitige estus transiri ĝuste al kontraŭuloj de Esperanto, inter kiuj troviĝas pli riĉaj kaj influaj personoj.

Kia do kaŭzo povas instigi al lernado de Esperanto kaj restado ĉe ĝi?

Sajnas al mi, ke la ekzemplo de la laboristoj donas al ni la plej verproksiman respondon.

Ĉu ne nia Majstro mem ofte ripetis, ke ne puŝis lin al kreo de Esperanto ia praktika motivo aŭ espero materialaj: ne ambiciamo aŭ simpla inventemo gvidis lian plumon verki lingvon kaj donaci ĝin al la mondo? Ĉu ne estis, li kiu, ĉiam kaj ĉie konfesis, ke grava por li ne estas la formo de la lingvo kaj ĝiaj kadroj eksteraj, ĉar kio kaŭzis, ke li penadis dum jaroj kaj jardekoj por inklinigi la mondon al alprenado de Esperanto, estis ne negoca profito kaj gajnoj de komercisto — li ĉerpis la persistemon al la malfacila laborado por sia lingvo sole el la **Ideo**, kiu vivigos lin kaj lian kreaĵon. Kaj tiu ideo estis paco kaj frateco inter homoj, amika tolerado de unuj al aliaj...

Ĉu do tiu spirito Zamenhofs ekmanikis inter la „neŭtralaj” kaj rifuĝis en niajn tagoj inter la laboristojn? Ĉar mi estas konvinkita, ke ne tiel ege taktike laŭplana, kiel plivere spirito internacia, supernacia (**ne** sennacia!) jen estas la kaŭzo, kial niaj nederlandaj laboristaj esperantistoj povas fiere porti super la kolonoj de siaj organoj tiajn nombrojn en unu sola lando, kiajn ni, aliaj, ne portas eĉ super dek gazetoj neŭtralaj kune kalkulitaj.

Ĉu komentoj estas necesaj?

EL POSTMORTA PAPERUJO DE HELENA HEMPEL.

W. BELZA.

Pola Himno

Ho, pola glora lando,
Sankta nia patri',
Kian senfinan ĉarmon
Vi havas ja por ni!

Kontraŭ la malamikoj,
Potenca fortikaj' —
Por ni, vi ĉiam estis
Vivfonto kaj armaj'.

El mur' de Ĉenstohova,*)
Rigard' de Dipalrin',
Regino adorinda,
Protektis ĉiam vin.

Kaj pro inspiro ŝia,
Via militistar'
Kuraĝe iam marŝis
Al Ĥocim', Vien', Bar',**)

Ĝis kie sin etendas
Baltika malproksim',
Famiĝas via nomo
Atingas via lim'.

Amnda patruj' nia
Karega la Polland'
Pro via libereco
Komuna sonas kant'.

„Por vi la sango nia,
Por vi, la pens' kaj vort'
Por vi la fortoj ĉiuj
Por vi la viv' — ĝis mort'”.

Alflugu, aglo blanka —
Pro la mirakl' de Di'
La prosperec' antaŭa
Rebrilas ja al ni!

Elpollgls Helena Hempel.

Rim. de la trad.

*) En ĉenstohova preĝejo sin trovas fa-

ma, mirakla bildo de Sta Virgulino Maria.

**) Lokoj de famaj polaj bataloj.

HENRYK SCHNUTZER.

ESTONUJO — LANDO KAJ POPOLO

Ne ĉiam estas facile — eĉ ne por tiuj, kiuj vizitis Estonujon — precize klarigi la karakterizajn trajtojn de la moderna Estonujo. Estas fakto, ke sur rilate granda terspaco de la lando loĝas tre kultura malgrandnacio, kiu vivas kaj disvolviĝas en plena interna kaj ekstera harmonio. Kvankam ĉiuj observantoj konsentas, ke Estonujo estas moderna lando, tamen nur malofte oni trovas tiel abundan, plenan da ĉarmo kaj trankvilo, maldifektitan naturon kiel en Estonujo. Jen la entreprenema industria, komerca Estonujo — jen la progresema agrikultura Estonujo, sed apude restis ne velkiganta Estonujo de arbaroj, fontoj, lagoj, rojoj kaj montetoj, kies spirito spiras ankoraŭ per la malnovaj estonaj mitoj pri Taara kaj Vanemuine, pri Koit kaj Ĥmarik, kaj per poezio de „Kalevipoeg”¹; kies sankta tero sonas ankoraŭ per malĝajaj, melankoliaj melodioj de la dum pli ol 600 jaroj sub fremda jugo suferinta brava popolo, nun baldaŭ festonta 20-jaran jubileon de sendependeco.


La Estona Respubliko situas sur la orienta bordo de la Balta Maro inter la golfoj: Finna kaj Riga. En nordo ĝi estas limita de Finna Golfo, oriente de Sovetia Ruslando kaj la lago Peipsi (parte apartenanta al Ruslando), sude de Latvia Respubliko, okcidente de la Balta Maro kun la Riga Golfo.

Estonujo havas la formon de multipinta duoninsulo, ĉirkaŭita norde kaj okcidente de aro da malgrandaj kaj grandetaj insuloj, la plej grandaj el ili estas: Saaremaa, Hiu, Muhu, Wormsi; pli ol 1500 lagoj kaj lagetoj kovras la landon, formante inter arbaroj, herbejoj kaj kampoj pitoreskajn pejzaĝojn. Pri la lago Ĥemiste, troviĝanta proksime de Tallinn, cirkulas multaj legendoj. Laŭ la tersurfaco Estonujo estas onda ebenajo; la plej alta punkto Munamägi („Ovmondo”) leviĝas 325 m super la marsurfaco. La tuta lando estas trafluata de multaj riveroj kaj torrentoj, kiuj kreas kelkloke altajn pitoreskajn bordojn. Pluraj riveroj havas akvofalojn; la granda rivero Narva estas konata pro siaj du belaj a-

kvofaloj, kiuj estas parte utiligitaj por teknikaj ĉeloj. Vastaj densaj arbaroj donas rifuĝejon al multspeca bestaro. Atenton meritas riĉa en tiu lando kreskajaro kun specoj malofte renkontataj en Eŭropo (ekz. sur la insulo Saaremaa kreskas plej diversaj specoj de orhideoj kaj hedero). Florantaj erikejoj kun dissemnitaj diversloke betuloj kaj pinoj, arbaroj, riveroj kaj fontoj prezentas diversaspektan bildon.

Kiu serĉas ripozon — tiu havas por elekto sekajn rezinbalzaman pinarbaron aŭ banbordon kun refreŝiga, ozonriĉa

stonujo donis al la minoritoj naciaj kiel la unua el ĉiuj ŝtatoj vastan kultur-aŭtonomion; naciaj malpacoj en Estonujo ne okazas. La lando havas 19 urbojn, el ili la plej grandaj estas: la ĉefurbo Tallinn (150.000 loĝantoj), la universitata urbo Tartu (70.000 l.), la malnova hansa urbo Narva (26.000 l.), la bela banurbo Pärnu (29.000 l.) Estonujo estas agrikultura ŝtato, ĉar pli ol $\frac{2}{3}$ de la tuta popolo loĝas en la kamparo kaj vivtenas sin per terkulturado. Estonoj estas tre laborema popolo; laŭ la religio ili estas en sia plejmulto luteranoj, malgranda



Tallinn. Malnova fortikaĵa muro kun turoj. Malantaane preĝejo de S-ta Olai el XIII. jc.

parto estas grek-ortodoksa t. n. setuoj. Fremdulo renkontiĝas ĉie kun granda gastamo; Estonoj ne traktas turistojn kiel fonton de enspezo, sed penadas konigi ilin kun la ĝis nun malmulte konataj lando kaj popolo. La Estonoj estas blondaj nordanoj, ili apartenas al la finnugra gento; iliaj plej proksimaj parenpopoloj estas la finnoj kaj hungaroj; sur la nuna teritorio ili ekloĝis jam delonge antaŭ Kristo. La estona lingvo estas fonetika kaj belsona, ĝi apartenas al la urala (finna-ugra) lingvobranĉo, estas do tute fremda por ni.

La loĝantaro de Estonujo (1.130.000) konsistas el: 88,2% Estonoj, 8,2% Rusoj, 1,5% Germanoj kaj 2,1% alinacianoj. E-

Ĝis la XIII-a jarcento la estona popolo estis libera kaj memstara terkulturista kaj marista gento kun kompare alla kulturo. La Estonoj havis komercajn interrilatojn eĉ kun la popoloj de la Mediteraneo, kaj la siatempaj militiroj de la Estonoj (la konkero de la iama sveda ĉefurbo Sigluna k. a.) estis famekonataj.

En la XIII-a jc. venis en la Baltajn landojn la kruckavaliroj kaj danaj kaj germanaj komercistoj, kiuj komencis konkeri la landon. Dudek kvin jarojn la estona popolo batalis pro sia libereco kun la kruckavaliroj, sed ĝi devis submetiĝi al la superforto. Sekvis perforta baptado de la popolo kaj plej prema servutempo.

potencan de Rusujo, liberigis Estonujon de la fremda jugo. La 24-an de februaro 1918 la Estona Nacia Konsilantaro deklaris Estonujon memstara, sendependa ŝtato. Estonujo devis ankoraŭ travivi germanan okupacion kaj post fino de la okupacio la militon kun bolŝevista Rusujo. Sen armiloj kaj sen mono la malgranda popolo ekbatalis je vivo kaj morto. La heroeca batalado daŭris de fino de 1918 j. ĝis la komenco de 1920 jaro; per la Tartua paĉkontrakto de la 2-a de februaro 1920 Estonujo kiel la venkinta flanko povis certigi al si jam definitivajn sendependecon kaj komenci la konstruon de sia ŝtata vivo. Estonujo estas demokrata respubliko kun ŝtat-



floro de estona junularo ĉe akompano de popola instrumento „Kannel”.

Pro sia bona geografia sitno Estonujo estis allogaĵo por ĉiuj najbaroj, kaj konstantaj militoj por konkeri Estonujon, daŭris dum jarcentoj. Sur la estona teritorio regis Germanoj, Danoj, Poloj, Svedoj kaj Rusoj. La prema kaj senluma servutempo daŭris pli ol 600 jarojn. Kelkaj mallongaj periodoj dum la regadtempo Pola kaj Sveda (la XVI-a kaj XVII-a jc.) permesis al la sklaviĝinta popolo iom respiri; la cetera tempo ankaŭ la lasta Rusa regadtempo (1721—1917) estis por liberecoifanta Estono kvazaŭ tempo por elmortado. La mondmilito kaj la rusa revolucio, faligante la

estro kaj parlamento (riigikogu) kiel reprezentantoj de la nacio. Eksteraj politikaj interrilatoj de Estonujo kun la najbaraj ŝtatoj estas la plej bonaj. Speciale menciindaj estas la vera amikeco inter Polujo kaj Estonujo, kaj la konstante pligrandigantaj komercaj, kulturaj kaj turistaj ekinteresiĝoj de la ambaŭ ŝtatoj. En februaro de k. j. okazis en Nacia Teatro en Tallinn la solena inaŭgura prezentado de la pola nacia opero „Halka”.

La klernivelo en Estonujo estas alta, ĉar analfabetoj inter Estonoj preskaŭ ne ekzistas. La elementa kleroj estas de-

viga: preskaŭ en ĉiu familio troviĝas iu kun mezlerneja klereco, kaj terkulturiŝto kun universitata klereco ne estas maloftaj. Ankaŭ la reto de profesiaj lernejoj estas densa.

Funkcias du altlernejoj: la Universitato en Tartu kaj la Teknika Instituto en Tallinn. Krom la menciitaj altlernejoj ekzistas du muzikkonservatorioj, kelkaj artlernejoj, teatra lernejo ktp. Grandaj teatroj troviĝas en Tallinn (la impona nacia teatro „Estonia“ konstr. en j. 1910—1913) kaj Tartu: ili kaj la provincaj teatroj estas konstruitaj per sumoj, kolektitaj de la popolo jam antaŭ la sendependeco. Enhavriĉaj naciaj muzeoj atestas pri la riĉeco de antikvaj trezoroj. Laŭ sia folkloro Estonujo estas unu el la plej riĉaj en Eŭropo: atestas pri tio la riĉaj kolektoj de la Etnografia Muzeo en Tartu. Eksterlerneja kleri-

go estas organizita tutlande per popularaj universitatoj kaj diversaj kursoj: popularaj bibliotekoj troviĝas ĉie. Kvankam la estona libro estas jam 400-jara, la estona nacia literaturo, arto kaj scienco povis vastskale ekprogresi nur dum la sendependeco. La tre valora estona muziko komencis rimarkinde progresi jam dum la pasinta jarcento pere de kantfestoj, kies tradicioj ĝisvivis la nuntempon. Somere en j. 1938 je honoro de la 20-jara jubileo de la sendependeco okazos kantfestoj, kiun partoprenos 25.000 agantoj (kantistoj, muzikistoj).

Estonujo estas laŭnature bela kaj laŭ urboj laŭ sia historio, laŭ sia konstruo tre interesaj. Kiel nova turisma lando en la nordo Estonujo estas interesa por ĉiuj, ĉar ĉi-tie la fora pasinteco parolas kun la moderna estanteco, ĉi-tie kruĝigas okcidento kaj oriento kun nordo.

EL LA AŬSTRALIA LITERATURO.

La Alarmhorloĝo de Arvie Aspinall

De Henry Lawson (1867—1922).

(Fino)

Li ofte estis leginta la liniojn kaj forte admiris ilian rimon-ritmon. Jam ofte li ripetadis ĝin al si, kun neniu alpenso al ĝia senco aŭ filozofio. Neniam eniris en lian kapon la ideo, ke povas esti malvera io presita — kaj jen io gravurita. Sed nun nova lumo ŝajne levigis antaŭ li. Li studis la frazon dum momento kaj tiam voĉlegis ĝin la duan fojon. Li turnadis ĝin denove, denove en la penso, silente.

„Patrino!“ li impetis. „Miaopinie tio estas mensogo“. Si metis la horloĝon sur breto, komfortige enfaldis al li la tukojn en lia kuŝloko sur la sofo kaj estingis la kandelon.

Ŝajnis, ke Arvie dormis, sed la patrino sterniĝis nur por maldormi, pensante pri siaj malfeliĉoj. Pri la edzo, kies kadavron oni unu matenon hejmen-portis de la laborloko; pri sia plej aĝa filo, kiu ĉiam revenis el malliberejo por pu-raziti sur ŝiaj mizeraj vivrimedoj; pri la duenskita filo, kiu sukcesis bonstatiĝi en alia urbo kaj do ne plu volis vidi ŝin; pri la tria — kompatinda, malfortika Arvie, etulo — kuraĝe baraktanta helpi, kaj foruzahita sian nemultan for-

ton ĉe fratoj Grinder, kiam, anstataŭ tio, li devus frekventi lernejon; pri la kvin senpovaj idetoj pli junaj, kiuj dormis en la apuda ĉambro; pri sia kruda penpeza vivo — purigante domlaboron — super tuk-lava kuvo — devante eduki la infanojn en la atmosfero de krimkvartalo, ĉar ŝi ne havis rimedojn por povi transloĝigi en pli alte pagatan; pri la problemoj kiel kunskrupi lu-monon.

Arvie ekmurmuris en dormo. „Ĉu vi ne povas endormiĝi, Arvie?“ ŝi demandis. „Via gorĝo doloras? Ĉu vi volas ion?“

„Tre plaĉas al mi dormi“, li obtuze diris, kvazaŭ ensonge, „sed ŝajnis ne pli ol momento antaŭ ol — antaŭ ol —“

„Antaŭ ol kio, Arvie?“ ŝi petis, rapidatone, timante ke li deliras.

Li parolis en la dormo.

Si levigis senbrue kaj antaŭen-puŝis la hordifinilon je du horoj. „Nun li povas ripozi sen ĝeno“, ŝi en si flustris.

Post iom Arvie subite sidlevigis kaj diris ekscitite: „Patrino, mi pensas aŭdi la alarmon bati!“ Tiam, ne atendante respondon, li abrupte falkuŝiĝis kaj ekdormis.

La pluvo jam foriĝis, kaj brila, stelriĉa kupolo de l' ĉielo klare volbis su-

per maro kaj urbo, domaĉo kaj luksdomo; sed ne grandan pecon da ĝi oni povis vidi el la mizera loĝejo en la strato Jones, krom nura ekvido al la Suda Kruco kaj kelkaj steloj ĉirkaŭ ĝi. Jen kion sinjorinoj nomas „bela nokto” kiam ili rigardas ĝin de la balkono de la domo — kun ĝiaj lumbanataj terasoj kaj ĝardenoj malkrute deklivantaj ĝis la akvo, kaj ĝiaj fenestroj iluminitaj por Paska bala, kaj ĝiaj akceptoĉambroj plenplena de ĝia propra, ekskluziva rondo, kaj unu el ĝiaj ĉarmaj, talentaj filinoj, fandanta en larmojn aron da bontonuloj per sia kortuŝa deklamo pri etknaba stratpurigisto.

Efektive estis io misfunkcia en la alarmhorloĝo, aŭ sinjorino Aspinall faris ian eraron, ĉar vere la marteleteto ekbatis nervosaltege en la mezo de la nokto. Ŝi vekigis, dolore surprizite, kaj

senmove kuŝis, time atendente, ke Arvie vekite levigis. Sed de li ne venis eĉ bruto. Ŝi turnis blankan, terurtorditan vizaĝon direkte al la sofo, kie li kuŝis — la lumo de la sola lanterno en la strato fluis tra la fenestro, kaj ŝi vidis, ke li neniel moviĝis.

Kial la alarmo ne vekis lin? Li ja estis malprofunda dormanto.

„Arvie!” ŝi vokis; nenia respondo. „Arvie!” denove ŝi kriis, kaj stranga tono de protesto sin miksis kun la teruro en ŝia voĉo. Arvie neniam respondis.

„Dio mia!” ŝi ĝemegis. Ŝi levigis kaj staris ĉe la sofo. Arvie kuŝis sur la dorso kun falditaj brakoj — preferita dormopozicio lia; sed liaj okuloj estis larĝe malfermitaj kaj fikse rigardis supren, kvazaŭ ili rigardus penetre tra plafono kaj tegmento ĝis en la lokon, kie Dio devus esti.

Tradukis R. Banham, Melbourne.

KAROL SZYMANOWSKI

(Funebra rememoro).

Dolora, malĝoja sciigo traflugis dum la paska dimanĉo la tutan mondon. La koro de Ĝenia pola komponisto eksilentis por ĉiam.

Porrabis malhonaŭgura malsano, „malsano de Chopin” tiun fortan homon tro malfrue en la periodo de la plej granda disvolvigo de lia talento.

Karol Szymanowski naskiĝis en la jaro 1883 en bieno Tymoszwówka en Ukraino, kiel posteulo de konata pola nobela familio. Lia patra domo satigita estis per kulturo kaj subtila muzika atmosfero. Li komence studis en Warszawa ĉe Zygmunt Noskowski, poste Berlino, Vieno kaj Parizo. En 1927-a jaro li fariĝis direktoro, poste rektoro de muzika konservatorio en Warszawa. Li ricevis la titolon de doktoro de filozofio honoris causa de la Jagellona Universitato en Krakovo kaj de honora profesoro de Universitato en Riga.

Kun li perdas la mondo unu el plej grandaj komponistoj nuntempaj, pioniron de novaj muzikformoj, ĉar la nova arao en la historio de la nuntempa muzikarto en renaskiĝinta Polujo, danke al Karol Szymanowski disfamigis la polan muzikon en la tuta mondo. Liaj unuaj komponaĵoj aperis en jaro 1905 kiel naŭ preludoj, poste kiel kantoj. Jam liajn

unuajn verkojn karakterizis eco de inspirita sento kaj jam tiuj unuaj verkoj estis por la pola muziko vera revelacio. En la plua kreado de la komponisto, la skalo de nuancoj fariĝis ĉiam pli riĉa; ekestis grandioza „Tria Simfonio”, belega opero „Reĝo Roger” kaj granda oratorio „Stabat Mater”.

En la lastaj jaroj dum estado en Zakopane, li ekkonis montajn kantojn, kiujn ludis por li fama orkestro sub gvidado de Bartek Olbrochta. La iom sovaĝa, iom sopirplena muziko ĉarmis lin, kaj li preskaŭ forkaptis la animon de la popola montana melodio kaj metis ĝin en la muzikon de la baletoj „Harناسię”. Pasintan jaron ĝi estis prezentata en la Pariza Operejo kaj trovis grandegan sukceson danke al belegaj popularaj melodioj, kiuj estis prilaboritaj per majstra tekniko, kaj danke al la danco de mondfama baletestro Lifar. Nun okazas la prezentado de Harناسię en Usona Carnegie Hall, kaj en la plej proksima tempo Artur Rodziński, mondfama kapelestro dum simfonia koncerto en Cleveland (Ohio) gvidos persone la unuan realigon de Harناسię kun ĥoro, kantanta polon. Bedaŭrinde nun eksonas ĝi sur dua duonglobo sub signo de funebro in memoriam de granda komponisto.

Por honori la memoron de la granda Majstro, kiu dum longaj jaroj ĉerpis el la trezorejo de la Podhala tero motivojn por sia arto, decidis la loĝantaro de Zakopane krei eternan fondadon, kies procentoj estos uzataj kiel stipendioj por junaj, talentaj muzikistoj de krakova konservatorio. Similajn fondadojn kreas ankaŭ aliaj urboj.

La Statprezidanto distingis la mortintan komponiston per granda rubando de ordeno „P o l o n i a R e s t i t u t a” por arta kreado tiel valora por pola kaj tutmonda kulturoj. Laŭ intenco kaj komuna deziro de tuta pola nacio oni decidis enterigi la genian Majstron en la pola Panteono en Kraków (Tomboj de Merituloj), nome en preĝejo sur „S k a ł k a”, kie en multaj subteraj niĉoj ripozas en eterna dormo poetoj, artistoj, grandaj, meritplenaj Potoj.

La 7-an de aprilo alvenis el Warszawa frumatene la vagono-kapelo kun ĉerko, kiun oni alportis al preĝejo de Sankta Maria.

Post la funebra diservo la ĉerko kun la mortaj restaĵoj de Karol Szymanowski estis lokita sur artiste farita, per nigra drapo kaj purpura veluro kovrita velurilo, kiun tris ses ĉevaloj en funebra krepo.

En tiu momento, dum mistera silento eksonoras trompetoj de la Sankta Mariaturo, adiaŭantaj la grandan artiston per ludsignalo kaj akompanas ilin la tonoj de funebra marŝo de Chopin.

Dum la funebra konduko ŝoviĝas en direkto al Skatka, adiaŭas la neforgeseblan Majstron krakovaj preĝejsonoriloj kaj apud la reĝa kastelo Wawel la potenco sonorilo „Zygmunt”, kies sonoj ĉiam por eterna dormo akompanadis la polajn reĝojn kaj grandajn virojn. El malproksime aŭdiĝas malgaja melodio, kantata de 500 krakovaj infanoj.

Apud la ĉerko adiaŭis la grandan artiston reprezentantoj de la Ŝtato, de la urbo Kraków, de scienco kaj muziko. Post funebraj paroladoj sekvis la plej kortuŝa momento, kiam en la kripteksonis melodio malgaja, montana melodio ludita de Bartek Olbrochta, kiu speciale venis kun sia orkestro el Zakopane por adiaŭi la amatan komponiston de „Harnasie”, kies melodioj maskiĝis en polaj montoj.

Post Chopin estis Karol Szymanowski

en nuntempa epoko la plej genia komponisto pola, en kies verkoj forte batlas la pulso de eŭropa kulturo. La inspirofonto de ambaŭ geniaj artistoj fariĝis popolmuziko. Same Chopin, kiel Szymanowski eksentis ĝian spiriton kaj speciale la spiriton de la popoldanco. Same Chopin kiel Szymanowski flame amisis la Patrujon, sed kvankam la muzikon de ambaŭ geniuloj disigas ne tro granda diferenco dumtempa, tamen ĝi respesuligas spiriton de du epokoj: de Patrujo tragika, mallibera kaj Patrujo renaskiĝinta, triumfanta. La muziko de Chopin sopirplena, lirika, enhavas tutan mondon de romantika poezio, de baladoj kaj kantoj, kiuj postulas nur unu muzikinstrumenton, fortepianon aŭ liron, ĉarma muziko, kies melodioj elparolas la tutan polan animon, ĝian potencon kaj tragedion. Li sopiras je libera Polujo, li suferas pro neebleco ekvidi la polan teron.

Kontraŭe Karol Szymanowski esprimis en siaj verkoj la ĝojon, la triumfon pri Polujo liberigita, kaj por substreki tiun ĝojon potencon ne sufiĉis jam nur unu instrumento. La melodioj eksonas amase kvazaŭ tuta kapelo, ĉarmante, mirigante la aŭskultantojn. Ĉiuj liajn verkojn distingas monumenta konstruo, sed ambaŭ geniaj komponistoj meritas admiron de Potoj, ĉar dum Chopin certigas al nacia arto senmortan lokon en regiono de pianoforta literaturo, Szymanowski similigis polan, instrumentalan muzikon al muziko de Beethoven kaj Wagner.

Ne ĉiuj trovas en liaj verkoj plenan kontentecon, ne ĉiuj komprenas la neĉiutagan, novstilan teknikon, sed estas fakto, ke liaj verkoj estas siaspecaj majstraĵoj, fruktoj de nekutima, subtila sniritito. Tial lia komponista agado fariĝis por la juna generacio de polaj muzikistoj refreŝiganta fonto, alportanta freŝajn inspirojn. Serĉante ĉiam pli novajn vojojn kaj esprimilojn, ili studas scivole subtilajn elementojn kaj novajn formojn en liaj verkoj, kaj admiras lin kiel la plej individuon, majstran pedagogon.

En rondo de talentaj samaĝuloj-amiĝoj, aspirantaj la glorajn vojojn de komponista laboro, li atingis la ĉefan lokon kaj fariĝis reprezentanto de novaj formoj en pola komponado. Restante sub influo de fremdaj elementoj, kome-

ce germanaj, poste francaj kaj novrusaj, li kapablis konservi propran indviduecon kaj formis sian apartan muzikstilon. Speciale la amatan folkloron li levis al suproj de majstra komponarto en impona, artistita ornamo.

Liaj personaj meritoj kaj ecoj kiel homo kungitaj kun neĉiutagaj kvalitoj de lia spirito, faciligis al li kontakton kun eksterlando, tiel dezirindan por la disvolvo de pola muziko kaj kaŭzis, ke Karol Szymanowski fariĝis ankaŭ unu el la plej indaj reprezentantoj de pola kulturo.

Li restos por ĉiam modelo de l' artisto, kiu alten suprenlevis la standardon de sia arto. Karol Szymanowski eniris en Panteonon de la gloro de pola nacio kiel unu el tiuj, kiu efektive lin gloron pligrandigis. Sen morta restos lia nomo en la popolo kaj lia arto brilos por ĉiam al la kulturo de la nuntempaj kaj estontaj generacioj!

Hermina Bertig-Dattnerowa.

EUGENIUSZ MATWIEJCZUK.

La vento okcidenta

Mistera blov' de vent', de vento okcidenta,
ak, multe nun al mi dum sia diras kur'...
parolas pri batal', pri l' mort', pri l' viv' turmenta
kaj flustras pri malam', bestigo kaj terur'!

En ĝia stranga bru' sonetas ĝem', sufero...
de pereanta hom'... sub bat' de frata man',
ĝi diras, ke sur ter' kreigis novinfero,
en kiu al sangdanc' prezidas mem... satan'.

Mistera tiu vent' mistere ĉion diras,
kaj kantas pri malben' dum sia kur' tra l' spac',
sekrete flustras ĝi, ke homa kor' sopiras
al fino de Fikrim', al vivo, am' kaj pac'.

* * *

Ho, kara Hispanuj, mi sorton ploras vian,
ho, savu vin kompat' kaj granda Dia am',
mi preĝas... ploras mi... kaj helpon vokas Dian,
ke venu fin' al krim' kaj al terura Dram'.

BIBLIOGRAFIO

LA VERKO DE CHOPIN. Verkis Mieczysław Biernacki. El pola lingvo tradukis kaj biografion verkis Dr. Jan Mędrkiewicz, Eldonis: Literatura Mondo, Budapeŝt IX, Soroksári-ut 38-40. Formato: 19×13 cm. 28 paĝoj. Prezo: 0.60 sv. fr.

La lasta frazo de ĉi tiu broŝuro tekstas: „Kaj, pro tio, la kulto de Chopin estas ne nur festo de pola muziko, sed estas akto de la kredo pri la memstara evoluo de la pola spirita kulturo, akto de la kredo pri la pola ideo“. La citita frazo klarigas plej bone la celon, kiun la aŭtoro volis atingi per sia verketo. Li volis en populara formo evidentigi al siaj

samlandanoj, ke la muziko de Chopin estas ĝis la radikoj pure pola kaj ke oni ne povas kompreni la spiriton de lia verkaro, se oni ne konsideras la kulturan fundamenton, sur kiu elkreskis la granda geniulo.

Ĉu la aŭtoro sukcesis atingi la tendencitan celon? Jes, centprocente jes! Kiu ne havas tempon aŭ la necesan muzikan instruitecon por studi la ampleksan literaturon pri Chopin (Kleczyński, Karasowski, Liszt, Huneker k. a.), tiu kun plej granda plezuro legos la verketon de Biernacki kaj devos konfesi, ke la aŭtoro konvinkis lin pri la ĝisfunde pola karaktero de Chopin-a muziko.

La lingvo de la traduko estas bona, la stilo eleganta, sed tamen estas troveblaj kelkaj malglatuloj kaj neĝustaj. En la biografia skizo, verkita de la tradukinto, la adjektivo „gracila” („Malgraŭ gracila korpokonstruo Chopin estis la plej eminenta virtuozo...”) estas netrafte uzita, ĉar la verkinto certe volis esprimi la kadukecon, malfortikecon de la organismo. Kelkfoje la tradukinto kontuze uzas la artikolon, ekz. en la frazoj: „Ĝi esprimas... la simbolojn...” (paĝo 9.) aŭ... „specon ne de la danco...” (paĝo 11.) la difinita artikolo estas forlasinda. Anstataŭ „omago” (paĝo 15.) preferinda estas la vorto „homagio”, anstataŭ „akompanamento” (paĝo 18.) kaj „kromatika” (paĝo 24.) oni uzu prefere „akompano” kaj „kromata”, anstataŭ „renverse” sur la paĝo 18. devas esti „inverse”. Sur la paĝo 21. ni trovas jenan frazon: „...stari ĉe la plej belaj sonatoj de Beethoven...” La neĝustan prepozicion „ĉe” oni devas anstataŭigi per **apud**. En la frazo (paĝo 14.) „...en konduki popolan muzikon al la granda templo...” pli logika estus la formo „en la grandan templon”. Kial la tradukinto nomas templon? Kial la tradukinto nomas la ĉefurbon de Polujo jen „Varŝovio” jen „Varsovio”? Ni restu ĉe la formo „Varsovio”, kiu preskaŭ oficialiĝis. Same ni konsentas kun la ŝajne fonetika transskribo de la nomo „Mallorca”, ĉar tiu hispana vorto estas elparolata kiel „Maljorka” sed ne „Majorca” aŭ „Mallorka”, kiel volas la tradukinto.

Fine riproĉo direktita kontraŭ la eldonejo. Polaj nomoj, kiujn ni renkontas en la teksto estas kripligitaj, ekz. Czartoryski, Sapiĉa, Radziwitt, anstataŭ Czartoryski, Sapiĉa, Radziwitt. Se la eldonisto estus petinta la tradukinton, ke li faru la preskorekton, tamen ni vane serĉus en la libreto preserarojn. Kiel strangajon ni citu, ke eĉ la nomo de la aŭtoro estas kripligita, ĉar sur la titolpaĝo vidiĝas la nomo „Bieznacki” anstataŭ „Biernacki”...

Napoleono.

VERKOJ DE FEZ. Plena verkuro de Dr. Felikso Zamenhof. Sub redaktado de Edvardo Wiesenfeld. Eldonis: Literatura Mondo, Budapeŝt IX. Formato: 23×15 cm. Paĝoj 272. Dikolore presita sur glata papero. Prezo: broŝ. 4. — bind. 4.90. — lukse bind. 6.50 sv. fr.

Kiam la 4. de decembro 1933 foriris de ni Felikso Zamenhof, ne ĉiuj konsciis la grandecon de la perdo, kiu trafis la esperantistaron, ĉar ne ĉiuj sciis, ke la mortinto estis io pli ol... la frato de la Majstro. La postmitita generacio legis de tempo al tempo malfrandajn poeziaĵojn de FeZ, kiun li malabunde aperigadis jen en Pola Esperantisto”, jen en „Literatura Mondo”, aŭ „Heroldo de Esperantisto”. Sed la veteranoj de nia movado sciis bone, ke F. Zamenhof jam en la jaro 1888 verkis grandiozan poemon s. t. „Vizito de la steloj sur la tero”, kiun aperigis en la sama jaro la sola tiama gazeto „Esperantisto”.

Se ni konsideras tiun poemon kaj la samtempajn plej verŝajne versaĵojn „Bruas vento” ne nur el arta, sed antaŭ ĉio el lingva vidpunkto, tiam ni skuas la kapon pro mirego, ke en lingvo, kiu apenaŭ antaŭ kelkaj monatoj komencis sian modestan marŝon tra la mondo, oni povis esprimi tiajn profundajn pensojn kaj subtilajn sentojn. Kaj kiajn rimojn uzas FeZ en tiuj du poemoj!

Vere, tre talenta devis esti Felikso Z., se li ankoraŭ antaŭ 50 jaroj scipovis forgi en nia tiam infanaĝa Esperanto tiajn rimojn kaj tiajn ritmojn.

Ĉu vi kredas, ke unu el siaj plej fruaj kreaĵoj, nome en la versaĵo „Bruas vento”, li jam uzis onomatopeajn formojn? Kaj kun kia majstrecio! Jen la unuaj strofoj:

Rondas, bruas, arbojn skuas
Bruemulo vento.
Ŝanĝas, ŝiras kaj detruas,
Tremas fundamento.
Falas branĉoj, velkas floroj,
Verdiĝas aromoj...

Per konvena adapto de vortoj kun la sono „r” la poeto perfekte reproduktas la krakadon de rompiĝantaj branĉoj kaj de balanciĝantaj arbokronoj.

Multflanka estis la literatura agado de F. Zamenhof, kiu verkis ne nur poeziaĵojn, sed ankaŭ teatraĵojn, novelojn, publicistajn artikolojn k. t. p. kaj ĉie la sama karakteriza trajto de lia menso — noblaj ideoj de poeto kaj pensulo, sopiro de moralisto al interfrata kunvivo de ĉi homaro kaj forta kredo, ke malgraŭ ĉio la estontaj rilatoj inter la popoloj estos bazitaj sur etikaj principoj.

Se ni komparas la lingvon de la plej malnovaj verkoj de FeZ kun la lingvo uzata de nia nuntempaj literaturistoj,

ni konstatas kun surprizo ke la lingvaĵo de FeZ estas tute „moderna”. Tie kaj ie oni renkontas lingvajn detaletojn, kiuj sendube impresas nin iom „arkaikaj”, sed tiaj negravaj diferencoj ne povas difekti la ĝeneralan karakteron de FeZ-a lingvo, kiu esplorata el ĉiuj eblaj vidpunktoj prezentas siu kiel modela.

Nun kelkaj vortoj pri origino de la recenzata libro. Prilaboris ĝin nia konata L. K.-ano Edvardo Wiesenfeld, kies antaŭparolo evidentigas kortuŝan pietismon, kun kiu la redaktinto traktis la prilaboratan materialon. Multaj notoj de la redaktinto atestas pri liaj vere admirindaj diligenteco, konscienco kaj kompetenteco, kiuj ĉi faktoroj ebligis al li pliricigi la esp. literaturon per vera juvelo.

Laŭdinda estas la eksterajo de la libro, nome bonega glata papero kaj zorga dukolora preso. Bedaŭrinde la kovrilo difektas la estetikecon de la eldonajo, ĉar ĝi certe ne estas bongusta. La projektinto de la kovrilo volis supezeble esti tro originala kaj kreis fuŝaĵon.

Fine tute specialan laŭdon meritas preskaŭ absoluta manko de preseraroj, kiu ĉi „virto” ne ĉiam estas trovebla en la eldonajoj de L. M. Ni diras „preskaŭ”, ĉar sur la paĝo 29, devas esti VIII-a anstataŭ X-a, kaj sur la paĝo 31. — „Aŭdu” anstataŭ „Audu”.

Napo Leono.

MULTE PLI LA AMO. Komedio en tri aktoj. Verkis: L. E. Thomson. Eldonis: Literatura Mondo. Budapeŝt IX. Formato: 19×13 cm. Paĝoj 32. Prezo: 0.50 sv.fr.

La aŭtoro nomas sian verketon — komedio. Eble tiu difino estas iom pretendema. La simpatian teatraĵon ni nomu — farso.

La medio estas pure esperantista, ĉar la agado okazas en Arnhem kaj estas intime ligita kun la Cseh-Instituto. La komikeco kaŝiĝas ne en situacioj, sed en karakteroj de la rolantoj, kvankam la aŭtoro posedas evidente talenton por elvoki humoron pere de komikaj situacioj. Ĉu ne estas forte komika tia situacio: La loĝejmastrino Greca, kiu suferas pro kaloj, demetas en ĉesto de jua antaŭ kelkaj minutoj enloĝiĝinta nova lernanto de la Cseh-metodo, Ivano, siajn pantoflojn, por montri al la novalveninto, tra truo en la ŝtrumpo, kiel bone efikas kontraŭ la kaloj medikamento,



Katalogon petu de la
admin. de „Pola Esp.

kiun donacis al ŝi ŝia pensionulo Johano.

Kiel ni jam diris, komikaj estas ne la situacioj, sed la personoj, inter kiuj ne mankas ankaŭ groteskaj tipoj kaj antaŭ ol vi komencas legi la teatraĵojn, vi jam scias anticipe, ke Hans estas drinkema, Johano — trinkema, Julia — poeziema kaj Zefira — filistra” paumangantino”, ĉar tiel karakterizas ilin la aŭtoro en la „personaro”.

Tiu ĉi farso aperis unue en Literatura Mondo, kaj spertis tiom varman akcepton flanke de esperantistoj, aranĝaŭtaj amatorajn prezentadojn en la kluboj, ke la eldonejo reprenis ĝin en libroformo.

La aŭtoro lerte uzas Esperanton. La dialogoj distingiĝas per flueco kaj karakteriza koncizeco de la lingvo, sed la plezuro dum la legado estus pli granda, se la aŭtoro ne estus farinta kelkajn neĝustajojn. Se oni ne scius, ke la verkinto estas anglo, oni facile povus konjekti lian gepatran lingvon, ĉar en la libro troviĝas tipaj „anglismoj”. Ekz. sur la paĝo 11. „Mi atendis trovi amikon ĉi tie...” rememorigas la anglan” I expected”, kiu tamen signifas en ĉi tiu frazo „mi esperis”. Same (paĝo 11.) „...nia reciproka amiko” ne estas ĝusta, ĉar laŭsence devas esti „nia komuna...” La naciecon de la aŭtoro malkaŝas ankaŭ la vorto „golfluboj” (p. 5.). Plej verŝajne la verkinto kreis ĝin laŭ la angla „club”, sed tiu „pliriĉigo” de nia lingvo estus tute superflua, ĉar la angla „club” estas precize tradukebla per „ba-

stono" aŭ „frapilo". Se oni volas diri, ke jam estas malfrue, oni ne povas uzi la formon „jam malfruas" (p. 12), ĉar malfrui signifas veni malfrue, okazi malfrue (vidu Vortaron de Kabe, p. 51). La aŭtoro en unu frazo (p. 15) metas post la vorto „enamigi" la prepozicion „kun", en alia (p. 16) la prepozicion „al". Nu, ni restu ĉe la Zamenhofa „enamigi en", kiu eble ne estas tute logika, sed akiris nekontesteblan civitanecan en nia lingvo. Kial la aŭtoro donas al la verbo „altrudi" netransitivan senceon? En la frazo „...mi esperas, ke mi ne altrudas..." devas esti „...ke mi ne altrudigas".

Napol Eono.

ETA — POSTMARK — ALBUMO. Eldonita de Udruzenke Ĉinovnika P. T. T. Struke, Drinska Seketja, Sarajevo, Jugoslavio. Prezo de ĉiu kajero — 1 respondkuponon.

La kolektaĵo de poŝtmarkoj estas agrabla kaj instrua pasio, precipe se oni okupas sin pri filatelio serioze. Tiu ĉi pasio estas tre disvastigita meze de esperantistoj, kion oni povas klarigi facile per la fakto, ke nur nia lingvo ebligis al filatelistoj senperan interkorespondadon kun popoloj de la tuta mondo por intersangaĵaj celoj.

La recenzata albumo konsistas el du 16-paĝaj kajeroj, el kiuj unu katalogas jugoslavajn markojn aperintajn en la periodo 1921—1930 kaj la alia en la periodo 1931—1936. La klarigaj tekstoj de la albumo estas dulingvaj: Esperantaj kaj kroataj. Pri ĉiuj serioj oni trovas datalajn informojn, kiujn oni vane serĉos en aliaj tiaspecaj albumoj.

En la dua kajero anoncas la eldonistoj, ke la sekvanta volumeto enhavos la postmilitajn markojn de Boŝnia kaj Hercegovino.

Se la eldonejo volas fari plezuron al tiuj, kiuj interesigas pri la albumo, ĝi zorgu pri tio, ke la aperonta kajero estu libera de preseraroj.

N. Apoleono.

XII-a SOMERA UNIVERSITATO. Konferenco de Instruistoj. Konferenco de Virinoj. Dum XXVIII-a Unversala Kongreso de Esperanto en Vien, aŭg. 1936. Kompilita de kortega kons. Hugo Steiner, Internacia Esp. Muzeo, Vien 1937. Formato 15.5×23 cm. Paĝoj 64. Prezo 5 intern. respondkuponoj.

Okazas la unuan fojon, ke la prelegoj havitaj en la kadro de dumkongresisa Somera Universitato aperas en libra formo. Bone memorfiksu ĉi tiun daton, ĉar ĝi havas historian gravecon en la evoluo de nia movado.

La ĉapitro „XII-a Somera Universitato" enhavas naŭ prelegojn kies temoj, kun unu sola escepto — traktas pri diversaj fenomenoj de internacia vivo. Komprenible ne povas manki en tia „societo" ankaŭ pure esperantaj temoj. La nivelo de la prelegoj ne estas unueca, ĉar apud altvaloraj traktadoj kiel ekzemple „Ligo de Nacioj kaj kunligiteco de la nacioj" de Arthur Müller aŭ „La perspektivoj de la Esperanta literaturo" de K. Kalocsay ni trovas esecojn, kies nivelo estas „sennivela". Eble en la estonteco la komitatoj organizantaj Somerajn Universitatojn zorgos pli pri la nivelo de ĉi tiu institucio.

En la du pluaj ĉapitroj estas kompilitaj prelegoj kaj rezolucioj pri instruado de Esperanto en la lernejoj kaj pri signifo de nia lingvo por virina movado.

La broŝuro havas tre plaĉan aspekton, estas zorge presita kaj ĝia kovrilo atestas pri bona gusto de la eldonisto.

Na Poleono.

MARISTA RAKONTO. Kanto kun plano.

Laŭ angla kanto. Teksto reverkita de F. W. Buenting. Prezo: 3 belgaj francoj. Ricevebla ĉe admin. de „Pola Esperantisto", Kraków, Lubicz 34. La teksto agordas iom humore, kvankam ĝi speciale en la komenco aspektas preskaŭ tragédie. Tu maristo falis el ŝipferdeko en la maron. Vane lin serĉas kamaradoj, sed en la noktmeza horo aŭdiĝas lia voĉo el marprofundiĝo, ke li troviĝas ĉe la marvirino en la marregno, kie li instruas Esperanton. Depost tiu tempo havas la esperantistoj dum renkontiĝo kun marvirinoj okazon paroli Esperante. Tial la bonhumora kanto povas havi kiel propagando por Esperanto siaspecan valoron, kaj se la Esperanta propagando penetros ĝis la marprofundajo, ni povas esperi, ke ankaŭ sur tersupraĵo Esperanto trovos ĉiam pli multe da simpatuloj kaj adeptoj. En la muziko oni devas substreki ian similecon al polaj popolmelodioj, kaj tiu fakto certigas al la kanto senduban sukceson en la rondoj de polaj esperantistoj.

N. D.

P O L L A N D A K R O N I K O

NOVAĴOJ PRI LA JUBILEA KONGRESO EN VARSOVIO.

Pli ol 300 kongresanoj aliĝis al la Kongreso.

Al la Kongreso aliĝis jam pli ol 300 kongresanoj el 22 landoj. Sed multaj landoj ne estas ankoraŭ reprezentataj. Ni klopodu, ke ĉiuj landoj de la mondo nepre havu siajn reprezentantojn. Ankaŭ penu, dekobligi la nombron de kongresanoj! Ĉiu kongresano ricevas senpage la oficialan gazeton de la Kongreso „La Jubilea“.

Esperanta kabaredo unika dum la Kongreso.

Dum la Interkonatiga Vespero okazos Esperanta Kabaredo kun artista progra-

mo. La arangojn prizorgas s-anoj J. Forge, L. Lejzerowicz, J. Szapiro kaj aliaj. Ĝi estos unika tiaspeca arango dum la Universala Esperanta Kongreso. Detaloj pri aliaj arangoj en la sekvontaj komunikoj.

Tiberio Morariu en Varsovio.

Varsovion alvenis famekonata propagandisto kaj instruisto de Esperanto s-ro Tiberio Morariu, kiu gvidas ĉi tie kursojn pli ol 50 personoj. Aliaj kursoj sojnj laŭ Cseh-metodo. Unu kurson parkomenciĝas en la plej proksimaj tagoj. Al la speciala kurso por policanoj enskribiĝis pli ol 50 pers. Ankaŭ estas preparata kurso por tramvojestoj.

* * *

CHORZOW. — Pola Asocio Esperantista. La 28. H. okazis ĝen. kunveno de Rondo Esperantista, en kiu oni decidis ŝanĝi la ĝisnunan nomon de la grupo je „Pola Asocio Esperantista“ (Polskie Stow. Esperantystów) kaj samtempe partan ŝanĝon de la statuto. La alinomigon oni faris por plivigli la Esp.-movadon en nia urbo. La estraro konzistas el jenaj personoj: Prez. s-ro E. Kołodziej, Viceprez. s-ro Eug. Kędzior; sekr. s-ro Konst. Czaja; aŭst. sekr. s-ro Józ. Szyma; kas. s-ro Jerzy Marzec; Rev. kom.: s-ro Roman Kornelius, s-ro Terf. Mathias, f-ino Maria Bargiel. Konsil. s-ro Jan Koczek.

S-ano Kołodziej Emu festis en oktobro sian 25-jaran Esp.-jubileon. La grupmembroj jaranis al li memorlibreton. La 9. I. okazis Zamenhofvespero kun danco, partoprenis 70 personoj. En aprilo oni malfermis Esp. kurson por komentantoj.

KRAKOW. — Jaŭde, la 8-an de aprilo k. j. okazis en salonego de Industria Muzeo sub protektorato de Lia Ekscelenco Sendito kaj Ministro de Estonujo en Warszawa, H a n s M a r k u s solena „Estono Vespero“. La programo konsistis el paroladoj, lumbildoj kaj muzika parto. La vesperon inaŭguris dir. Władysław Rutkowski, per interesa antaŭparolo, menciante la amikajn sentojn inter Poloj kaj Estonoj. La vespero bone sukcesis danke al klopodoj de ĉiam fer-

vora samideano s-ro Schnützer, kiu ankaŭ tralegis kelkajn simpatiajn leterojn, alvenintajn okaze de vespero el Estonujo, pritraktaktantajn speciale egalajn ecojn de e s p e r a n t a l i n g v o kaj m u z i k o kiel ĉefaj helpiloj celantaj la alproksimiĝon de popoloj. Tiu problemo havas por ni des pli grandan signifon, ĉar speciale la Estonoj ludas ĉe tiu alproksimiĝo gravan rolon.

— Dum kunveno de laboristoj interesiĝantaj pri Esperanto, okazinta la 14. de februaro k. j. oni decidis fondi ĉe T. U. R. (Societo de Laborista Universitato) grupon, al kiu oni donis nomon Laborista Esperanto-Klubo. La 25. de febr. okazis konstituiga kunveno, dum kiu oni elektis jenan estraron de la grupo: k-do Stefan Dziwlik — prezidanto, k-do Aleksander Radwański — vicprezidanto kaj k-do Roman Drapala — sekretario. La klubo havas propran ejon ĉe la strato Bracka 5, m. 10. La membroj kunvenas lunde, jaŭde kaj sabate vespere.

— Post finiĝo de multenombre frekventata kurso okazis la 22. de aprilo k. j. en granda salono de Industria Muzeo ekzameno, al kiu submetiĝis 28 kursanoj. La ekzamena komisiono, kiun prezidis Dro L. Rosenstock esprimis al la ekzamenitoj plenan kontenteton pro bonegaj rezultatoj.

LUBLIN. — Terura, senkompata morto forrabis la 9. IV. k. j. el niaj vicoj

famekonatan, energian kaj iniciatople-
nan samideano D-ron Jan Mędrkiewicz,
gismunan Prezidanton de Pola Esperanto-
Asocio Filio en Lublin.

En la lokon de eterna ripozo la ĉer-
ko estis portata parte de esperantistoj,
parte de aliuloj.

Vicprezidanto de nia Societo s-ro mgr.
Cz. Pruski post fino de funebraj ceremo-
nioj faris sur la tombejo pollingve fune-
bran paroladon, finante ĝin per kelkaj
frazoj en Esperanto.

Enterigo okazis la 11. IV. k. j. La

GVIDLIBRO PRI RIO-DE-JANEIRO, ĈEFURBO DE BRAZILIO.

Eldona de la Ministrejo por Ekster-
landaj Aferoj ĉe la Stata Presejo. Du-
kolora kovrilo, 13 paĝoj de teksto, 31
paĝoj da ilustraĵoj sur luksa papero, kaj
urboplano.

Kiu deziras ĝin ricevi, bonvolu sendi
peton (kun respondkupono por la poŝto)
al unu el la subaj adresoj:

Ministério das Relações Exteriores, Av.
Marechal Floriano, Rio-de-Janeiro. Bra-
sil.

Brazila Ligo Esperantista, Av. Mare-
chal Floriano, 212. Rio-de-Janeiro. Bra-
sil.

Już ukazało się II-gie wydanie aprobo-
wanego przez Ministerstwo W. R. i O. P.
podręcznika esperanckiego pt. „LEKCJE
JĘZYKA ŚWIATOWEGO ESPERANTO”
— w opracowaniu **prof. Sygnarskiego**
z przedmową **prof. uniw. dra Bujwida**.
Cena podręcznika, zupełnie zmienionego,
znacznie rozszerzonego i zaopatrzonego
w dwa słowniczki — tylko 1'60 zł, prze-
syłka 25 gr. Do nabycia w Administracji
„Pola Esperantisto”, Kraków, Lubicz 34.
(Konto PKO 406.660) lub w „Naukowem
Kole Esperanekim”, Bydgoszcz, plac
Wolności 9. (Konto PKO 141.787).

Mortinto orfigis edzinon kaj tri junagajn
infanojn.

SZAMOTULY. — Ĉe la ŝtata gimnazio
depost kelkaj jaroj estas instruata ne-
devege Esperanto laŭ la lernolibro de
prof. Sygnarski; nuntempe ekzistas du
kursoj, por komencantoj kaj por progre-
sintoj. Fondigis gimnazia „Esperanto-
Rondo”, regule kunvenata ĉiumonate; la
gimnazianoj abonas la junularan gaze-
ton „Juna Vivo” el Nederlando kaj vikle
korespondas kun eksterlando. Kelkaj ler-
nantoj intencas partopreni ankaŭ la Ju-
bileen Kongreson en Warszawa.

POŝTMARKOJ KUN TEKSTO EN ESPERANTO.

Kiu sendos al Brazila Ligo Esperan-
tista — Av. Marechal Floriano, 212, Rio-
de-Janeiro, Brazil — du poŝtajn respon-
dakuponojn, tiu ricevos tri poŝtmarkojn
kun esperanta teksto (de VIII kaj IX
Int. Specimena Foiro kaj de IX Brazila
Kongr. de Esp.) en fermita konverto.

Kiu sendos kvar respondkuponojn, tiu
ricevos, per rekomendita letero, la tri
poŝtmarkojn en la konverto kaj la sa-
majn sur la konverto.

ALVOKO AL KUNLABORADO.

La Redakcio petas insiste:

a) literaturemajn legantojn pri kun-
laborado per regula alsendado de origi-
nalaj kaj tradukitaj literaturajoj.

b) propagandistojn pri verkado de ar-
tikoloj koncernantaj la problemojn de
esperantista movado.

c) estrarojn de societoj apartenantaj
al P. E. D. pri regula sendado de rapor-
toj kaj koncizaj notoj pri la agado de
siaj grupoj. La enhavo de la komunika-
joj estu vere esenca. Oni evitu troadon,
paneĝiradojn, personajn reklamojn k. s.

Se vi deziras, ke „Pola Esperantisto”
estu interesa legajo por ĉiuj kaj inde
reprezentu la landon de la Jubilea Kon-
greso, provizu ĝin per leginda materialoj!

PRENUMERATA: rocznie zł. 8.—, półrocznie
zł. 4.— Dla Towarzystw i grup esper. ro-
cznie zł. 6.— Zagranicą: 7 fr. szw. Numer
pojedynczy zł. 0.70. podwójny zł. 1.40.

OGŁOSZENIA: 1/2 strony zł. 30.— 1/4 strony
zł. 15.— 1/8 strony zł. 10.— Korespondencja:
małe ogłosz. z 10 słów (prócz adresu) zł. 1.—

PRZEKAZ ROZRACHUNKOWY. KARTOTEKA NR.

ABONO: Jare zł. 8.—, duonjare zł. 4.— Por
societoj kaj grupoj esperantistaj jare zł.
6.— Eksterlande 7 sv. fr. Aparta numero
zł. 0.70 duobla zł. 1.40.

ANONCOJ: 1/2 paĝo zł. 30.— 1/4 paĝo zł. 15.—
1/8 paĝo zł. 10.— Korespondado: anoncento
de 10 vortoj (krom adreso) zł. 1.—

29. -- KONTO P. K. O. NR. 406.660.

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: KRAKOW, LUBICZ 34.